# La 60-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET-60)
# INFORMILO No 1

Latvia Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni **la 60-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-60)** – la plej popularan Esperanto-aranĝon en Baltiaj landoj, la aranĝon kiu havas jam pli ol 60-jaran historion (la unua BET okazis en 1959 ĝuste en Latvio).

**TEMPO:** BET-60 funkcios **de la 4-a ĝis la 11-a de julio 2026.**

**LOKO:** BET-60 okazos en **Rigo** – la ĉefurbo de Latvio. La urbo situas ĉe la suda marbordo de la Riga Golfo de la Balta Maro. La historia centro de Rigo situas ĉe la dekstra bordo de la rivero Daŭgavo, proksimume 10 km de ĝia enfluejo en la Rigan Golfon. Distanco de la plej proksimaj eŭropaj ĉefurboj laŭ aŭtovojoj: Vilnius – 300 km, Tallinn – 310 km, Helsinki – 400 km, Stokholmo – 550 km, Varsovio – 660 km, Berlino – 840 km. La antikva urboparto de Rigo estas registrita en la listo de la Monda Kulturheredaĵo de Unesko. Rigon oni nomas la metropolo de secesia stilo (*Art Nouveau, Jugendstil*), ĉar en ĝia centra parto proksimume 40% el ĉiuj domoj estas secesi-stilaj konstruaĵoj, kio estas multe pli ol en aliaj eŭropaj urboj.

**BET-ejo:** Riga Teknika lernejo pri turismo kaj kreiva industrio (latvalingve: Rīgas Tūrisma un radošās industrijas tehnikums), strato Nīcgales 26, Rigo.

**PROVIZORA PROGRAMO:** diversnivelaj Esperanto-kursoj, Somera Universitato, vasta kultura programo, duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj, kvizoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj.
**Kontribuoj al la programo estas atendataj kaj bonvenaj.**

**KOTIZO:**

| Landoj laŭ kategorioj | ĝis la 28.02.2026 | de la 01.03. ĝis la 30.06.2026 | de la 01.07.2026 |
|---|---|---|---|
| Landoj de kategorio A | **50 EUR** | **70 EUR** | **90 EUR** |
| Landoj de kategorio B | **70 EUR** | **90 EUR** | **110 EUR** |

Landokategorioj: A: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; B**:** Ĉiuj aliaj landoj.

**LOĜADO:**
**En la studenta hotelo de la Teknika Lernejo (strato Nīcgales 26):**
1) po 30 EUR diurne por persono en dulita – kvarlita ĉambro (duŝejo kaj necesejo por du ĉambroj);
2) po 45 EUR diurne por persono sola en dulita – kvarlita ĉambro (duŝejo kaj necesejo por du ĉambroj). La prezoj estas provizoraj kaj povas ŝanĝiĝi.

**En hoteloj de Rigo (rezervado memstara).**

**MANĜADO:** Estos organizita matenmanĝo kaj tagmanĝo, informo pri la prezoj en la Informilo No 2.

**ALIĜO:** Aliĝu rete https://www.esperanto.de/eo/bet-aligho aŭ plenigu la aliĝilon kaj sendu: margarita.zelve@gmail.com Samtempe pagu la aliĝkotizon.

**PAGEBLECO:**
Al bankkonto de Margarita Želve: Swedbank, SWIFT**:** HABALV22,
IBAN**:** LV71HABA0551022317372

Aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de kotizo ne validas.

**ATINGEBLECOJ:** Rigon eblas atingi buse, trajne (el Tallinn kaj Vilnius) kaj aviadile. La flughaveno provizas flugojn en pli ol 100 itineroj, ĝi situas 10 km de la urbocentro.

**KONTAKTEBLECOJ:**
1) rete: bet@esperanto.de; margarita.zelve@gmail.com;
2) telefone: + 371 26407174 (Margarita)

**La detalan informon kiel atingi BET-ejon, pri ekskursoj, detala programo k.a. en Informilo No 2.**

**BONVENON AL LATVIO!**

**Organiza komitato**